



Boletín

n° 417 Januario - Marto 2017



Lernejanoj de Cheste vizitas la ekspozicion pri Esperanto

Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 417

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun per-
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrún

Kasisto: Rosa López

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor

Raúl Martínez

Alejandro Escobedo (prezidanto
de Hejs)

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8397

Salutvortoj

Karaj amikoj:

Alvenas al viaj manoj la unua numero de 2017, la Jaro Zamenhof. Kiel ni jam anoncis en pasinta eldono, nia movado devas omaĝi la figuron de nia granda nekonato, okaze de la 100-a datreveno de lia forpaso, kaj en tiu ĉi numero vi povos legi pri la unuaj iniciatoj jam entreprenitaj en Hispanio.

Ankaŭ la grupoj iom post iom prenas iniciatojn por profiti la jaron por ekstera informado. Vi legos pri la agado de nia veterana klubo en Cheste (Valencio), kiu honoras sian multjardekan tradicion per la diskonigo de la lingvo inter la loĝantoj de la urbo. Oni iam konsideris la urbon kiel tiun en kiu ekzistas plej granda proporcio de esperantistoj, kompare al la loĝantaro, kaj ni ĝojas ke la lokaj aktivuloj plu portas la torĉon de Esperanto, kun la apogo de la urbestro. Ili sendube estas spegulo por aliaj grupoj kaj aliaj urboj.

Ankaŭ en Teruelo daŭras la aktivado de la loka grupo, por la organizado de nia nacia Kongreso. Ili pretigas programon, kies unuan version vi povos legi en tiu ĉi numero, ege varian kaj kompletan. La urbestro aldonis nian eventon al la festado de la 800an datrevenon de la legendo de la Geamantoj de Teruelo, kaj konfirmis la nomadon de “Placo Esperanto” al spaco en la urbo, kiun ni inaŭguros dum la Kongreso. Ne mankos koncertoj, turismaj vizitoj, festado, prelegoj, prezentado de libroj, kaj multe pli, inklude de oficialaj ekzamenoj. Eventoj antaŭ- kaj post-kongresaj atendoj tiujn kiuj povos resti pli da tempo en la urbo.

Multon plian kolektis nia redaktoro ĉinumere: informojn pri aktivado, sed ankaŭ pri aliaj eventoj, kiel la nove organizata Internacia Semajno, esperantan kulturon, inklude de novaj libroj, interesajn artikolojn, originalajn kaj tradukitajn. Espereble la legado donos al vi ĝuon, sed ankaŭ instigon por via agado kaj via kulturaplikado.

*José Antonio del Barrio,
prezidanto de HEF*

Enhavo

Salutvortoj	1
Provizora programo de la 76a Kongreso de HEF	3
Ekspozicio pri Esperanto en Cheste	6
Inaŭguro de la Jaro Zamenhof en Hispanio	7
Zamenhof en Casa Sefarad / Zamenhof cupón de la ONCE	8
Pri Grupoj kaj Asocioj	9
KER ekzamenoj en Zaragozo en junio/Esperanto Duolingo	12
Junularaj renkontoj	13
Konata neesperanta eldonejo publikigis dungvan poemaron	14
Projekto D-19 Delegitoj de UEA	16
Unua ĉapitro de Industrias kaj Andanzas de Alfanhuí	17
Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo	18
La 24-a Esperanto Semajno de la Kulturo kaj Turismo Cambrils	19
Esperanto kaj universitataj aferoj	22
La majstro mortis, la majstroverko ne	24
Kronikoj pri la tajfoj de Badajoz (daŭrigo)	26
Prelego de Mati Montero	30



La 11-an de februaro ĉi-jare forpasis samideano Santiago Mulas Gallego. Lia nomo estas tre ligita al la porEsperanta aktivado en Asturio, ĉefe en Ĥiĥono, lia urbo. Li esperantiĝis en la jaro 1959 kaj de tiam li konstante dediĉiĝis, dum pli ol 50 jaroj, al la instruado de la internacia lingvo. Ekde la jaro 1976 al 2006 li prezidis la lokan organizaĵon de Ĥiĥono, kaj en la jaro 1979 li estas la prezidanto de la Loka Komitato de la 39-a Hispana Kongreso de Esperanto. En 1983 li gvidis E-kurson en Avilés; ĝi estis la semo de grupo de Esperanto kiu sekve formiĝis en tiu urbo. Ekde la jaro 2006, kiam estis elektita nova prezidanto de Astura Esperanta

Asocio, Santiago Mulas estis nomumita Honora Prezidanto. De tiam, kaj dum lia sano tion permesis al li, li plu dediĉiĝis al la instruado de Esperanto en tiu grupo.

Pli kompleta informo pri la historio de Astura Esperanta Asocio kaj la multjara aktivado de Santiago Mulas en ĝi, troveblas en la 84-a numero de *HELECO*, la presorgano de tiu asocio, publikigita en la jaro 2009 okaze de ĝia centjaro, al kies interreta paĝo oni povas aliri tra la adreso: <http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/84/h84.html>

INFORMO KAJ PROVIZORA PROGRAMO DE LA 76- A KONGRESO DE HEF EN TERUELO 2017



Karaj partoprenontoj en la 76-a Kongreso de HEF: Pretigu vin por vivi kelkajn tagojn en Teruelo, longaj tagoj kiuj vere ŝajnos mallongaj al vi!

Por alkitimiĝi al la etoso de Teruel, vi povas komenci per aŭskulti hispane ĉi tiun kanton:

https://www.youtube.com/watch?v=RiI9GhI_ZjU

(Dum la kongreso vi aŭdos tiun kanton en Esperanto, sed tio estos surprizo, mi ne scias kial mi malkovris ĝin)

Ni celas ke la 76a Kongreso utilos por disvastigi Esperanton inter la teruelanoj. Samtempe, ni volas montri al la esperantistoj la urbon, la provincon, nian historion kaj niajn pejzaĝojn.

Ni laboris forte por fari programon interesan kaj allogan. Ni miksis seriozajn kaj agrablajn agadojn, amuziĝon kaj lernadon.

Provizora programo de la Kongreso

La kongreso malfermos je la posttagmezo de la vendredo 23a kaj daŭros ĝis la dimanĉo 25a tagmeze. Tamen, la agadoj komenciĝos kelkajn tagojn antaŭe (la lundon 19an), kaj daŭros ĝis la mardo 27a.

Inter la lundo 19a kaj la merkredo 21a, ni realigos agadojn en la hispana, kun la celo disvastigi Esperanton inter la loĝantoj de Teruelo. Eble ni instalos informigan budon, ni distribuos skribitajn informilojn, prezentos filmon pri Esperanto, faros iun prelegon aŭ kolokvon...

La merkredon 21an ni prezentos la Kongreson en la “Casa de Aragón” (regiona domo de Aragono), en Madrido.

La ĵaŭdon 22an oni komencos la agadojn en Esperanto, kiuj tiutage certe inkludos kelkan turisman viziton kaj ankaŭ la malfermon de du ekspozicioj (pri Esperanto kaj pri la elstara teruelana esperantisto Francisco Azorín). Ni ankaŭ organizos agadojn pri la lernado de Esperanto en la reto (duolingo, lernu.net, edukado.net ktp)

La vendredon 23an matene estos dediĉita al alia turisma vizito. La vespero alvenos tre ŝarĝita per okazaĵoj: la malfermo de la kongreso, komuna vespermanĝo, la muzikludado de Martin Wiese kaj nokta astronomia observado farota sub la libera ĉielo.



Sabate 24an, la fruaj ellitigantaj partoprenos en la Generala Kunveno de HEF. Poste, ni prezentos la agadojn de la Jaro Zamenhof. Du el la plej allogaj eventoj de la kongreso okazos tiumatene: la prelego pri Francisco Azorín (en kiu partoprenos lia nepo Ernesto Azorín), kaj la inaŭguro de la "Placo de Esperanto" en Teruelo.

Posttagmeze, ni vizitos la Maŭzoleon de la Geamantoj de Teruelo kaj Miguel Fernández surprizos al ni kun pluraj agadoj kiujn mi ne volus malkaŝi. Nokte, alia muzika ludado,

farita de la nederlanda grupo Kajto Kvaropo.

Dum la dimanĉo 25a ni vizitos la urbeton Albarracín kaj ni malfermos la kongreson per komuna manĝado. Sed bonvolu ne eliri Teruelon ankoraŭ: tiu vespero ni dediĉos al viziti la spurojn de la Intercivitana Milito proksime de Teruelo.

La lundon 26an kaj la mardon 27an ni faros turismajn agadojn, kombine kun prelegoj kaj konferencoj. Se iuj ajn restas en Teruelo pliajn tagojn, ni certe prizorgos montri al ili aliajn interesajn aĵojn.

Kaj se vi volas resti por vivi en Teruelo –ni rekomendas tion al vi– bonvolu nuligi vian revojaĝon kaj estu bonvenaj al nia urbo kiel novan teruelano. Vi rajtas havi iun lokon ĉe la vicoj de "Liberanimo", la Teruela esperanto-asocio.

Ekzamenoj, seminarioj, atelieroj...

Por plibonigi nian nivelon de Esperanto, ni organizos intensivajn kursojn, seminariojn ...

Dum la kongreso okazos la parolaj ekzamenoj de "Tutmonda E-Ekzameno". (organizita el "Edukado.net", kun subteno de UEA). La skribita parto okazos en Zaragozo, la 10an de junio.

Dum la lundo 26a kaj la mardo 27a, TEJO organizos seminarion. Ni ankaŭ esperas ke dum la kongreso estos farita iun AMon-seminarion, verŝajne pri la agadoj de la "Jaro Zamenhof"

Turismaj vizitoj

Ni vizitos la belan vilaĝon Albarracín, unu el la plej belaj el Hispanio. Ni ankaŭ travizitos la urbon Teruelon, liajn mudeĥarajn monumentojn, la Maŭzoleon de la Geamantoj, la vestiĝiojn de la Intercivitana Milito...

Prelegoj, konferencoj

Mi jam menciis la prelegon pri Francisco Azorín. Ni ankaŭ povos aŭskulti prelegojn pri diversaj temoj: Priskribo de Teruelo, literaturo, libroj, muziko, instruado de Esperanto, historio de Esperanto en Aragono...

Kiel alveni Teruelon



malpli).

Ni pretas organizi komunan vojaĝon el Madrido, sed ni ankoraŭ devas konkretigi ĝin.

La kongresejo

La plej parto de agadoj okazos en la konstruaĵoj de la Universitato. La distanco inter la kongresejo kaj la urbocentro de Teruelo ne grandas (pli malpli, 700 metrojn) La muzikaj ludadoj kaj la turismaj vizitoj okazos ĉe la malnova parto de la urbo.

Gastigado

Ni rekomendas rezervi gastigon baldaŭe. Teruelo ricevas multajn turistojn dum la semajnfinoj de la somero, kaj povos okazi problemoj se la rezervo oni prokrastas. Kiam rezervanta, ni rekomendas menciigi ke vi partoprenos en la Kongreso de Esperanto, ĉar kelkaj hoteloj povos fari rabateton.

Teruel estas malgranda urbo kaj ne ekzistas grandaj distancoj. La malmultekostaj hoteloj plej proksimaj al la kongresejo estas "El Busto I y II", "Viñas 17", "Hostal el Cartero" kaj "Hostal Serruchi". La "Hotel Restaurante CLA" estas ankaŭ proksima sed ĝi povas esti iom pli multekosta.

En la koro de Teruel estas malmultekostaj kaj rekomendindaj hoteloj, kiel la "Fonda del Tozal," la "Hostal Alcazaba", la "Hostal Aragón" kaj "Hotel Teruel Plaza". Anstataŭe, "Hotel Mudayyan", "Hotel Reina Cristina", "Hotel Botánico" kaj "Hotel Torico Plaza" eble estos iom pli multekostaj.

Iom pli for estas pluraj malmultekostaj hoteloj: la "Albergue City Backpackers de Teruel" (apud la torejo), la "Hotel Isabel de Segura", la "Hotel Civera" kaj la "Hotel Oriente"

Alberto Granados Orcero

EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN CHESTE



Dum la unuaj semajnoj de la monato marto, la ekspozicio pri Esperanto kaj d-ro Zamenhof estis instalita en Cheste, urbo en la provinco Valencio, kiu, kiel bone konate, havas tre longan tradicion pri Esperanto, kaj estas sidejo de la historia klubo "Lumradio".

La ekspozicio konsistas el la paneloj pretigitaj de HEF, kun aldono de bildo kun fotoj kaj gazetaraj informoj rilataj al la historio de Esperanto en Cheste, plus diversa materialo havigita de la loka grupo. Ĝi estas montrata en la Teatro Liceo, historia kultura konstruaĵo de la urbo.

La ekspozicio estis inaŭgurita la 3-an de marto,



per ceremonio kiun ĉeestis multnombra publiko. Ĝi estis prezentita de José Manzanera, la prezidanto de la grupo, kaj parolis dum ĝi la urbestro, José Morell, la urbkonsilistino pri kulturo, María Angeles Llorente, kaj la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, kiu vojaĝis al la urbo por tiu okazaĵo.

Ambaŭ reprezentantoj, la urbestro kaj la urbkonsilistino, per varmaj paroladoj substrekis la riĉan historion de Esperanto en Cheste, en kiu eĉ tri stratoj portas la nomon de esperantistoj, kaj montris sian apogon por ke tiu tradicio plu daŭru en la vilaĝo. La unua frukto estis la lokigo de afiŝo en unu el tiuj stratoj, omaĝanta la esperantistajn virinojn de la urbo. Oni povas mencii ke la esperantistinoj plenumis kaj plenumas grandan rolon en la loka movado, kiel pruvas la fakto ke du el ili membris en la estraro de la grupo jam en la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento.

Dum la sekvaj tagoj, la loka grupo gvidis vizitojn al la ekspozicio, inter ili al lernejoj de la vilaĝo

INAŬGURO DE LA JARO ZAMENHOF EN HISPANIO

Hispana Esperanto-Federacio komencis en februaro la celebradon de la Jaro Zamenhof, la kunmemoron de la datreveno de la morto de D-ro Lazaro Zamenhof, la iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto, agnoskitan de UNESKO, la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por edukado, kulturo kaj scienco.

La 9an de februaro okazis publika prezentado en la Publika Biblioteko de la kvartalo Vallecas. Tiu loko estis elektita ĉar en la biblioteko situas la t.n. Centro de Pola Kultur-intereso de Madrido (loko por elmontrado de la kulturo de la komunumoj de enmigrintoj en la madrida regiono)



Ĝin partoprenis la direktoro de la Biblioteko, Maria del Carmen García-Risco, la direktoro de la Pola Instituto en Madrido, Mirosława Kubas-Paradowska, kiu montris la apogon de la institucio al la agado de la esperantistoj, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, kaj la direktoro de Fundación Esperanto, Manuel Pancorbo.

Oni kompletigis la prezenton per gvidata vizito al la ekspozicio pri

Esperanto montrata en la halo de la Biblioteko.

Dum la venontaj semajnoj ni plu informos pri aliaj detaloj de la agadoj antaŭvidataj. Sekvu niajn informojn en la sociaj retejoj aŭ abonu niajn bultenojn por resti informita. Kontaktu kun HEF por koni la detalojn, kaj ankaŭ por kunlabori en la organizado de aliaj iniciatoj por omaĝi tiun ĉi grandan figuron de la homaro kaj disvastigi liajn verkojn, liajn ideojn kaj la lingvo de li lanĉita.



Organización
de las Naciones Unidas
para la Educación,
la Ciencia y la Cultura

**100° aniversario de la muerte
de Ludwik Zamenhof**

Celebrado en asociación con la UNESCO

ZAMENHOF EN CASA SEFARAD



Iom antaŭe, la 2an de februaro, la prezidanto de la Federacio, José Antonio del Barrio, prelegis pri d-ro Zamenhof, lia verko kaj ideoj en la Centro Sefarad-Israel, institucio kreita de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj por flegi la rilatojn kun la juda kulturo, kies sidejo troviĝas en historia palaco en la strato Mayor de Madrido. La evento estis organizita por kunmemori la Jaron Zamenhof, okaze de la 100a datreveno de la forpaso de la iniciatinto de la lingvo Esperanto, kaj dum ĝi estis pritraktita ankaŭ la konekto de d-ro Zamenhof kun la juda kulturo de lia tempo kaj la historia kunteksto de lia verkaro kaj idearo.

La tuta prelego estas spektebla rete (hispanlingve) ĉe la jutuba kanalo de HEF, en la adreso <https://www.youtube.com/watch?v=5aFoyYYhZ3o>.

Kiel sekvo, la 6an de februaro, José Antonio del Barrio estis intervjuita en radiostacio dediĉita al la juda kulturo por hispanlingvanoj, Radio Sefarad. Ĝi estas aŭskultebla ĉe <http://www.radiosefarad.com/a-100-anos-de-la-muerte-de-l-l-zamenhof-padre-del-esperanto-con-jose-antonio-del-barrio-presidente-de-la-federacion-espanola/>

ZAMENHOF EN “CUPÓN” DE LA ONCE

Tuj antaŭ la prezentado de la Jaro Zamenhof, HEF ricevis la konfirmon ke la hispana organizaĵo de blinduloj, la ONCE, dediĉos unu el la biletoj de sia tre fama loterio (“cupón”), tiun de la 8-an de aŭgusto ĉijara, al la figuro de d-ro Zamenhof. La sukceson oni ŝuldas al la demarŝoj de nia samideano Pedro Zurita, kaj pri ĝi ni informos pli detale en venontaj bultenoj.

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Granda Kanario



En reprezento de la "Grupo Esperantista de Gran Canaria", sinjorino Lauren Parada transdonis ekzempleron de *Don Quijote* en Esperanto al la Kultura Direktorino de la Publika Ŝtata Biblioteko de Las Palmas, s-ino Rosa Coruña. En sama tago ni okazigis aliajn aktivaĵojn kiuj temis pri la algluo de afiŝoj kaj inaŭguro de la Esperanto-Kurso kies instruanto estas sinjoro Ángel González. La lerno-libro elektita estas *¿Sabe usted Esperanto?*. La libro estas senpage elŝutebla kiel PDF-arkivo, kaj utiligebla en diversaj aparatoj. Ni petas al niaj grupanoj kaj simpatiantoj laŭeble propagandi la Kurson ĉar ankoraŭ restas kelkaj lokoj disponeblaj. Al ĉiuj interesitoj oni sendis interrete la dosieron de la lernolibro.

La inaŭgura leciono estis dividita en tri duonhorajn apartaĵojn: la unua temis pri klarigo de gramatikaĵoj, la dua pri rekta korversacio en Esperanto, kaj la tria pri la Esperanto-Movado.

En nia "Grupo Esperantista de Gran Canaria" estas kaj veteranaj kaj novbakitaj samideanoj. Kompreneble ni esperas la alvenon de multaj komencantoj al nia nova Esperanto-kurso.

Tiun-ĉi novan semon ni optimisme lanĉas kun la espero, ke ĝi alportos sufiĉe da nutriĝaj fruktoj por nia Esperanto-Movado. Al Universala Kongreso de UEA en Koreio jam aliĝis niaj grupanoj Ángel González kaj lia edzino África García-Cano Martín. Alian aliĝon al Hispana Kongreso de Esperanto en Teruelo jam realigis nia samideano Echedey Jorge Santana.


Antonio Sarmiento

Tenerifo

Ni volas informi pri grava afero por nia klubo: transloĝiĝo.

Kadre de redistribuo de spacoj en la malnova domo de La Laguna kie Esperantista Societo de Tenerifo havas sian kunvenejon de antaŭ preskaŭ 70 jaroj, dum oktobro ni entreprenis transloĝiĝon al la unua etaĝo de la Domo. Ĉiu povas imagi la streĉiĝon malmunti, porti kaj munti la metalan bretaron de la biblioteko, mal(pendigo) de fotoj, tabuloj, porti seĝojn, tablon kaj aliajn meblojn kaj dekojn da kestoj plenaj de libroj kaj revuoj...

Nia nova ĉambro estas iom pli malgranda tamen pli luma kaj ĝi havas altan kaj riĉe ornamitan plafonon. Do bonvolu noti, ke ni estas en sama adreso, strato San Agustín, 23, tamen en unua etaĝo.



Esperanto Tenerife

Andaluzio

Kiel ĉiuj jaroj ni informas pri la ekzisto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, asocio kiu celas pri la disvastigo de la internacia lingvo en Andaluzio kaj pri la diskonigo de la andaluzia kulturo en la esperantista mondo. AEU estas asocio sendependa de la ceteraj lokaj grupoj ekzistantaj en Andaluzio, kvankam ni estas je la dispono de ĉiuj ili kaj ankaŭ de kiu ajn grupo aŭ homo deziranta disvastigi esperanton, ĉefe pere de la sendo de propagandiloj, libroj aŭ pere de aliaj kunlaboradoj por disvastigi nian lingvon en Andaluzio.

AEU eldonas la revuon "Gazeto Andaluzia" kvarfoje en la jaro, kaj la internan "AEU-bultenon" inter niaj membroj.

La pagenda kotizo por aparteni al AEU estas 20 eŭroj jare. Ĉi-jare, por tiuj kiuj pagos sian kotizon antaŭ la 30-a de aprilo, ni ofertas malgrandan propagandan donaceton, temas pri memor-bastoneto 8 Gb. Do, se Vi deziras esti membro de AEU, bv. sendi al ni leteron al la e-adreso: esperanto14@ono.com kaj enmetu en la konton de la banko BMN (eksa Caja General de Ahorros de Granada) n-ro n° ES80 0487 3225 1420 0000 6979.

Por pagi eksterlande bv. uzi jenan kodon: **IBAN ES80 0487 3225 1420 0000 6979 //SWIFT/ BIC : GBMNESMMXXX** konton nome de "Asociacion Andaluza de Esperanto"sciigante pri Via nomo kaj la afero: Kotizo 2017.



Madrido kaj Andaluzio



Félix Lobo

En Andaluzio, Saed Abbasi, vizitis Malagon, Granadon, Kordovon kaj Arundon. Kelkaj membroj de nia Asocio akompanis lin tra la ĉefaj stratoj, vizitante la plej gravajn monumentojn, inter ili, la jam faman “Cafetería Esperanto”, kie oni gustumis ĉokoladoj kun “churros” kaj profitis la okazon fotiĝi ĉe la pordo.



Teruelo

PRESENTADO DE LA KONGRESO EN TERUELO

La 3an de marto, la prezidanto de la LKK, Alberto Granados, kaj la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, prezentis al la lokaj amaskomunikiloj la bazajn liniojn de la Hispana Esperanto-Kongreso. La novaĵo estis publikigita en la tri ĉefaj lokaj kaj regionaj ĵurnaloj, Diario de Teruel, Herald de Aragón kaj El Periódico de Aragón, kaj ambaŭ estis intervjuitaj en la radiostacioj Cadena Ser kaj Radio Nacional de España en Teruelo. (anekse, la foto publikigita en Diario de Teruel; de maldekstre: Javier Martín, Alberto Granados kaj José Antonio del Barrio)



KER-EKZAMENOJ EN ZARAGOZO EN JUNIO!

La organizaĵo edukado.net, kun apogo de Universala Esperanto-Asocio, kunvokis por la monato junio mondan sesion de ekzamenoj de Esperanto laŭ la Komuna Eŭropa Referencokadro (KER). Laŭ tiu modelo, la skriba kaj parola partoj estas aparte organizataj. Por la 10a de junio oni programis la skriban ekzamenon samtempe en diversaj urboj de la mondo. Kadre de la Tutmonda ekzamensio, ni, la asocio Frateco, petis la okazigon de KER-ekzamenoj en Zaragozo, kien povos vojaĝi ĉiuj interesitoj.

Nun necesas ke oni komencu aliĝi, ĉar la plena oficialigo de la ekzamensio eblas nur kiam oni havas minimume 5 kandidatojn. Ni certe atingos tin nombron. Ankoraŭ eblas organizi ĝin ankaŭ en aliaj urboj, se ariĝas sufiĉa nombro da interesatoj. Por niaj latina-merikaj legantoj, sciu, ke okazos ekzameno en Manago.

La parola ekzameno estos celebrata dum la Hispana Esperanto-Kongreso kiu disvolviĝos du semajnojn poste, la 24an de junio, en proksima urbo Teruelo.

Interesatoj kaj kandidatoj, bv. skribi al la adreso kurso@esperanto.es sed por oficiale aliĝi oni povas sur la komuna aliĝpaĝo:

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Por pli da informoj:

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/organizantoj>

KER: <http://edukado.net/ekzamenoj/ker>

Specimenoj: <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj>

Priskriboj: <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/priskribo>

Eduardo Berdor

PLI OL 70.000 HOMOJ ALIĜIS AL LA KURSO DE DUOLINGO POR HISPANLINGVULOJ



Duolingo, la furora kurso por lerni Esperanton en la reto, atingis duan ŝtupon en sia versio el la hispana: ĝi nun estas atingebla kiel aplikaĵo (apo) en telefonoj kaj tabletoj. Ĝi aperis unue en oktobro kiel retejo, sed post la apero kiel aplikaĵo en januaro, post malmultaj tagoj, oni rimarkis grandan kreskon en la nombro da homoj kiuj komencis la kurson. Meze de marto jam pli ol 72.000 homoj registriĝis en la kurso de Esperanto.

Vidu la ligilon, se vi interesiĝas: <https://www.duolingo.com/course/eo/es/>

Eĉ se aspektas logike ke nur procentaĵo finis la tutan lernadon kaj komencis praktiki la lingvon, la anglalingva versio revoluciis grandan parton de nia komunumo, ĉefe en Usono kaj aliaj anglalingvaj landoj. Nun, oni esperas ke io simila povos okazi en Hispanio kaj en la latinamerikaj landoj. Ni jam rimarkis krome ke pluraj homoj kiuj lernis per tiu ĉi metodo jam alproksimiĝis la la grupoj, al la sociaj retejoj, aŭ aliĝis al la Federacio. Bonvenon al ĉiuj!

Ankaŭ la klasika retejo por lerni Esperanton, Lernu!, spertis antaŭnelonge renovigon kaj redizajnon, por fari ĝin pli altira kaj adaptita al la poŝtelefonoj kaj tabuletoj, kaj al la novaj manieroj aliri la reton.

Do, la asocioj kaj kluboj devas preti por informi la interesiĝantojn kaj la homojn finintajn la kursojn, trovi la manieron profiti la lernadon kaj ĝui la avantaĝojn de la lingvo.

JUNULAJ RENKONTOJ

Esperanto



HEJS

Nia junulara sekcio, HEJS, partoprenas en projekto de la Eŭropa Unio, organizita de la tutmonda asocio TEJO, pri efika komunikado por junularo. Du junuloj el Hispanio partoprenos en la evento PEKO, organizita de skolta asocio, kaj trejniĝos pri tiuj ĉi du temoj: kiel paroli kun diversaj aŭdiencoj (aĝgrupoj, personecoj, ktp) kaj kiel varbi/vendi ideojn. Venos pli postaj eventoj, kaj se vi estas juna, malpli ol 31 jaraĝa, kontakti kun HEJS por senpage ilin partopreni. La posta evento okazos en Hispanio, en Teruelo, la 26an kaj 27an de

junio, tuj post la Hispana Kongreso.

Krome, HEJS, kune kun la Kataluna Esperantista Junularo, decidis kandidati por organizado de la Internacia Junulara Kongreso de 2018, en la urbo Badaĥozo (Badajoz), profitante ke la tiujara Universala Kongreso okazos en Lisbono (Portugalia). Se vi estas juna (aŭ se vi ne estas tiom juna kaj pretas helpi, speciale se vi loĝas proksime), bv kontakti kun HEJS, hejs@esperanto.es, por kunlabori kun la organiza skipo.

KONATA NEESPERANTA ELDONEJO PUBLIKIGIS GRAVAN POEMARON EN DULINGVA (HISPANA- ESPERANTA) VERSIO

Kun María Ángeles Maeso mi konatiĝis en novembro 2014. La decido far la madrida esperantistaro “elkatakombigi” Esperanton tiel, ke ĝi fariĝu unu el la multaj elementoj en la kultura vivo de Madrido, sekvigis, ke oni kalkulas je ni por diversaj tiuspecaj aranĝoj. En unu el ili, mi estis invitita kiel E-verkisto konsistigi jurion, kune kun neesperantaj kolegoj, por verdikti pri la ŝatindeco de hispanlingvaj prozaĵoj kreitaj de ordinaraj najbaroj de la madrida kvartalo San Fermín, kadre de populara konkurso pri rakontoj. Ankaŭ Maeso, renoma hispana poetino, jurianis. Jam de nia konatiĝo, ŝi montris apartan intereson al Esperanto kaj al la fakto, ke mi poemas kaj prozas tiulingve. Plej afable ŝi donacis al mi ekzempleron de sia poemaro *Vamos, vemos* [Ni iras, vidas].

Apenaŭ mi revenis hejmen, mi komencis foliumi la libron. Temis pri la dua eldono de poemaro, kiu en 2003 gajnis la premion Internacia Poezi-Premio León Felipe. Ne eblis al mi forlasi ĝin. La versoj de Maeso kaptas onin. Ili ne fordonas sin unualege, sed lasas ekvidi sian spiriton kaj kreas scivolemon kaj la nepran bezonon reveni al ili. Ĉar ŝiaj versoj diras multege pli ol ili diras. Kaj havas ne pli kaj ne malpli da vortoj ol necese. Ĉio en ili estas pesita kaj pensita por estigi la envulton fare de l’ o pura. Per materialo unuavide facila, sed malfacilege ordigebla kaj metebla ĝustaloken. Nenio en ili impresas artifike. Forestas ornamaĵoj, enestas pulsobatoj kaj skuoj kaj bildoj, kiuj forprenas la animon.

Baldaŭ mi havis tradukitaj kvin el la poemoj de *Ni iras, vidas*. Nelonge poste mi prezentis ilin kaj la poetikon de Maeso en *Boletín* de HEF, n-ro 408, Oktobro-Decembero 2014; *Sennaciulo*, n-ro 1-2 (1315-1316), Januaro-Februaro 2015; *Sennaciulo*, n-ro 3-4 (1317-1318), Marto-Aprilo 2015; kaj *Beletra Almanako*, n-ro 23 (Junio 2015).

Antaŭ iom pli ol unu jaro, Lidia López, estrino de la hispana eldonejo Lastura, sciigis Maeso’n pri tio, ke, ĉar la dua eldono de *Ni iras, vidas* estas baldaŭ elĉerpiĝonta, endus pensi pri la tria eldono. La poetino respondis al ŝi: “Kaj kio, se tiu tria eldono aperus en dulingva (hispana-esperanta) versio?”. Lidia, gvidantino de eldonejo, kies devizo estas “la idealismo kiel eldona koncepto”, entuziasme akceptis la proponon.

Diversaj cirkonstancoj prokrastis unu jaron la aperon de ĉi amata tria eldono de *Vamos, vemos / Ni iras, vidas*. Sed, fine de la pasinta februaro, ĝi povis vidi la lumon. La novaĵo plej gravas al ni esperantistoj. La fakto, ke konata neesperanta eldonejo surpronis la aperigon de dulingva (hispana-esperanta) publikajo, estas escepta. Same kiel la fakto, ke E-poeto estis komisiita, krom traduki la hispanan originalan tekston, verki la prologon al la tria eldono, kiu aperas apud la prologoj al la du antaŭaj eldonoj, respektive faritaj de eminentaj hispanlingvaj verkisto kaj aŭtorino. Ne gravas, ke tiu tradukinto kaj prologinto estas mi mem. Gravas nur, ke tiun homon kiel reprezentanton de la



esperanta kulturo oni lokis samnivele kun la aliaj, kiuj reprezentas la hispanlingvan kulturon.

Pro ĉio ĉi, eldonejo Lastura meritas esti reciprokata de la esperantistaro per aĉeto de la libro –cetere, poezie kaj eldone plej altkvalita–, akirebla en ordinaraĵ hispanaj librovendejoj kaj ĉe la Lastura-retejo [<http://lastura.es/?product=vamos-vemos-ni-iras-vidas-ed-bilingue-castellano-esperanto>] kontraŭ po 10 €. Espereble, baldaŭ ankaŭ niaj ĉefaj libroservoj distribuos ĉi verkon. Mi kaptas la ŝancon por danki la esperantistojn, kiuj tuj post ol María Zocato distantamis ĉi aferon en la reto, sin turnis al la Lastura-retejo kaj aĉetis ekzemplerojn de la poemaro. Lidia López esprimis al mi siajn miron kaj kontenton pro ĉi faro. Ja se nia reago tiel pozitivus plue, Lastura

certe entreprenos pliajn tiuspecajn publikigojn, kiuj donas prestiĝon al nia lingvo, al nia literaturo kaj, ĝenerale, al la E-kulturo.

Pri Lastura, mi faras mia la finan frazon diritan de Rick en la filmo *Casablanca*: “mi antaŭsentas, ke ĉi tio estas la komenco de granda amikeco”.

Sanon kaj poezion!

Miguel Fernández

RENOVIGO DE LA LIBROSERVO DE HEF

Hispana Esperanto-Federacio profitis la komencon de la Jaro Zamenhof por renovigis Libroservon. Okaze de tiu ĉi jaro, ni proponas rabaton de la biografio de Dro. Zamenhof, “El hombre que desafió a Babel”.

Vidu liston de prezoj (inklude de rabatoj por membroj de HEF) kaj manierojn ilin akiri, ĉe: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/aprender-esperanto/venta-de-libros> aŭ petu la informon al la adreso de HEF.



PROJEKTO D-19

¡Fariĝu Delegito de Universala Esperanto-Asocio !

Rakontis al mi maljuna samideano, loĝanta tute izolita en fora urbo, ke unu el la plej agrablaj momentoj dum sia esperantisteco estis la tagoj, kiam alvenis per-poŝte la Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio. Ĉi tiu libro, kiu nuntempe aperas kaj surpapere kaj surekrane, enhavas informojn pri landaj kaj fakaj asocioj, movadaj instancoj kaj plurajn aliajn gravajn informojn pri la esperantista movado. Sed, verŝajne, la plej grava parto de tiu libro estas la Delegita Reto.

Memorigis min tiu sama maljuna esperantisto, ke li, tutfiere, montris tiun libron al siaj apuduloj, ofte mokemaj pri lingvo kaj movado, kaj tiel li pruvis, ke Esperanto ekzistas tra la tuta mondo kaj do, temas pri viva lingvo. Nuntempe ĉirkaŭ 1800 delegitoj el pli ol 90 landoj aperas en tiu reto.

Kio estas necese por fariĝi UEA-delegito? Unue, kompreneble, esti membro de Universala Esperanto-Asocio, dum almenaŭ unu antaŭa jaro kaj poste, tre simpla afero: prezenti peton. Nu, mi kuraĝigas ĉiujn kiuj estas membroj de la universala asocio fariĝi delegito. Estas necese krom-pagi nenion, estas necese sin devigi plenumi nenion. La celo estas faciligi al eblaj interesatoj informojn pri la urbo aŭ regiono, ekzemple: konsilojn pri vojaĝo, informojn pri turismo aŭ pri kelka konkreta afero de la urbo, ktp. Sed atentu, nenion kroman agadon estas necese realigi, verŝajne temas pri tre agrabla servo, ĉar ofte utilas por kontakti kun geesperantistoj el aliaj landoj.

Se en via urbo ne estas delegito Vi rajtas proponi Vin mem por tiu posteno, se li jam ekzistas, Vi povas esti Vic-delegito, krom Via delegiteco Vi povas esti ankaŭ fak-delegito, ili estas tiuj homoj kiuj fakas pri konkreta afero: historio, lingvoj, politiko... ekzistas centoj da fakoj kaj Vi mem eĉ povas proponi novan fak-delegitecon.



La projekto D-19 celas atingi ke ĉe ĉiuj hispanaj aŭtonomaj komunumoj ekzistu delegito, poste ni eĉ proponus novan celon D-52 (almenaŭ po unu delegito ĉe ĉiu provinco). Sed ni estu realistaj nuntempe kaj ni atingu unu delegiton, almenaŭ en ĉiu komunumo. Nuntempe, mankas UEA-delegitoj ĉe:

Baskio, Galegio, Navaro, Rioĥo, Ekstremaduro, Kastilio-La Manĉo, Ceŭto, Melilo.

Kaj ĉiuj scias, ke sur kelkaj el tiuj komunumoj loĝas aktivaj esperantistoj kaj eĉ posedas sufiĉe fortajn E-grupojn. Do, mi invitas tiujn kiuj jam estas membroj de UEA fariĝi delegito. Estas necese nur kontakti kun esperanto14@ono.com

José María Rodríguez Hernández
UEA-ĉefdelegito en Hispanio

UNUA ĈAPITRO EL ‘INDUSTRIAS KAJ ANDANZAS DE ALFANHUÍ’

de Rafael Sánchez Ferlosio

I. Pri ventokoko kiu ĉasis lacertojn kaj pri tio kion el ili faris infano

La ventokoko, eltondita el fera lameno kiu flankiĝas kontraŭ la vento sen moviĝi kaj kiu havas unusolan okulon videblan ambaŭflanke, sed kiu estas unusola okulo, malsupreniris unu nokton el la domo kaj iris surŝtone ĉasi lacertojn. Lunis, kaj li mortigis ilin per feraj bekofrapoj. Li pendigis ilin lozanĝe sur la blanka orienta muro kiu ne havas fenestrojn, el multaj najloj. Tiujn plej grandajn li metis supre kaj ju pli malgrandajn, des pli malsupre. Kiam la lacertoj estis ankoraŭ freŝaj, ili hontis, kvankam mortintaj, ĉar ankoraŭ ne sekiĝis ilia glandeto kiu sekrecias la hontoruĝon, kiu ĉe la lacertoj nomiĝas «hontoflavon», ĉar ili havas flavan kaj malvarman honton.

Sed post ioma tempo ili sekiĝis subsune, kaj iĝis nigrecaj, kaj ties haŭto kuntiriĝis kaj faltiĝis. Iliaj vostoj turniĝis suden, ĉar tiu parto plie kuntiriĝis subsune ol tiu de la nordo, kien ĝi iras neniam. Kaj la lacertoj restis laŭ skorpia sinteno, ĉiuj al la sama parto, kaj jam, ĉar ili estis perdintaj kaj la kolorojn kaj la glatecon de haŭto, ili ne hontis.



Kaj post plia ioma tempo, venis tiu de pluvo, kiu ekvapis la muron sur kiu ili estis penditaj, kaj ege trempis ilin sentinkturigante el ties vostoj suketon, kvazaŭ de verdnigra rusto, kiu fluis rojece laŭ la muro al la tero. Infano metis poteton ĉe ĉiu rojeto, kaj fine de la pluvo li estis pleninta la potetojn el tiu suko kaj li kunigis ĉion en pelvon por sekigi ĝin. Jam la lacertoj estis sentinkturigante ĉion, kaj kiam revenis la sunaj tagoj oni vidis surmure nur blankajn skeletetojn, kun fajna kaj travidebla kutiklo, kiel la serpentohaŭtaĵoj kiuj apenaŭ reliefiĝis el la murokalko.

Sed la infano estis pli frato de la lacertoj ol de la ventokoko, kaj unu tagon en kiu ne ventis kaj la koko ne povis defendi sin, li iris surtegmenten, elradikigis ĝin kaj ĵetis ĝin en la forĝejon, kaj ekblovilis. La koko kraketis sur la karberoj kvazaŭ ventus kaj li iĝis ruĝa, flava, blanka.

Kiam li konstatis ke li ekmoliĝas, li faldiĝis kaj brakumis per ĉiuj restintaj fortoj al granda karbero, por ne tute perdiĝi. La infano haltigis la balgon kaj surĵetis sitelon da akvo sur la fajro, kiu ekstingiĝis snufante kiel kato, kaj la ventokoko restis alkrōĉita porĉiame al la karbero.

La infano revenis al sia pelvo kaj vidis kiel estis restinta surfunde bruneca feĉo, kvazaŭ fajna ŝlimo. Post kelkaj tagoj, la tuta akvo estis foririnta pro la varmo kaj restis nur polvo. La infano diserigis ĝin kaj metis la amaseton sur blanka tuketo por vidi ties koloron. Kaj li vidis ke la polveto estis farita el kvar koloroj: nigra, verda, blua kaj ora. Poste li prenis silkaĵon kaj li trapasigis tiun oran, kiu estis plej fajna; tra linaĵo li trapasigis tiun bluan, tra kribrilo tiun verdan kaj restis tiu nigra.

El la kvar polvetoj li uzis la unuan, kiu estis el oro, por origi klinkojn; el tiu dua, kiu estis blua, li faris al si sablohorloĝon; tiun trian, kiu estis tiu verda, donis al sia patrino por tinkturiĝ fenestro-kurtenojn, kaj el tiu nigra, inkon, por lerni skribi.

La patrino ege kontentiĝis kiam ŝi vidis la industriojn de sia filo, kaj premie ŝi sendis lin al la lernejo. Ĉiuj kunuloj enviis al li la inkon ĉar ĝi estis ege brila kaj bela, ĉar ĝi havigis sepian nuancon kiel neniam ĝi estis vidita. Sed la infano lernis raran alfabeton kiun neniu komprenis, kaj li devis foriri el la lernejo, ĉar la instruisto diris ke li estis doninta malbonan ekzemplon. Lia patrino enfermis ĝin en ĉambro kun plumo, inkujo kaj papero, kaj avertis lin ke li ne eliros el tie ĝis li ne skribu kiel la ceteruloj. Sed la infano, kiam li vidis sin sola, ekprenis la inkujon kaj ekskribis laŭ sia rara alfabeto, sur blanka rompotolaĵo kiun li estis trovinta pende el arbo.

Tradukis Kani, (bv. sendi reagojn al *Boletín*.)

INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO

Kiel ni informis en la pasinta bulteno, unu el la plej tradiciaj kaj sukcesaj renkontiĝoj organizataj en la Iberia Duoninsulo, la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, atingas en 2017 sian 25an eldonon, kun nova organiza skipo. En tiu ĉi jaro ĝi okazos de la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro en la urbo Tossa de Mar, en la t.n. 'Costa Brava'. Ĉi tiu bela urbeto, antaŭe fiŝkaptista vilaĝo, nuntempe estas plejparte turisma loko, tre vizitata.

Oni kreis propran retpaĝon, por ricevi pliajn informojn, kaj ankaŭ por aliĝi. Vidu pliajn detalojn ĉe: <https://kulturacentro.blogspot.com.es/>

NEAJ SEMAJNOJ		
1993 SANT CUGAT DEL VALLÈS	2003 SANTA SUSANA	2015 LLORET DE MAR
1994 SANT CUGAT DEL VALLÈS	2004 SALOU	2016 SALOU
1995 SALOU	2005 GIBELLA	2015 ROSER
1996 CALELLA	2006 LA Pineda	2016 CAMBRILS
1997 S. CARLES DE LA RAPITA	2007 TOSSA DE MAR	2017 TOSSA DE MAR
1998 CALATRELL	2008 SALOU	
1999 CAMBRILS	2009 Pineda DE MAR	
2000 BLANES	2010 COMA-RUGA	
2001 LLORET DE MAR	2011 MALGRAT DE MAR	
2002 CAMBRILS	2012 CAMBRILS	

25-a INTERNACIA ESPERANTO - SEMAJNO
DE LA KULTURO KAJ TURISMO
DE LA 30-a DE SEPTEMBRO ĜIS
LA 7-a DE OKTOBRO 2017

TOSSA DE MAR

La 24-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO CAMBRILS 1-8.10 2016



Ĉi-foje la Semajno estis iom speciala. La naŭdekjaraĝa ĉef-organizanto Luis Serrano Pérez post la alveno al la hotelo vundiĝis je mano kaj devis reheimeniri la sekvan tagon. La torĉon transprenis Rosa Lopéz kaj ĝis la fino ŝi zorgis pri nia bonfarto. La Semajno tamen bone disvolviĝis. Okazis kelkaj programŝanĝoj kaj aldoniĝis programeroj, sed tio ne ĝenis la partoprenantojn, kiuj helpis kaj morale subtenis Rosa-n.

Ni loĝis en ampleksa kvarstela hotelo je malalta prezo, ĉar post la sezono la hotelo jam fermiĝis ĝis printempo. Abunda manĝaĵo bufede kun boteloj da akvo kaj vino kontribuis al kontento de ĉiuj. La vetero estis agrabla kaj suna, do eblis sin bani en la hotela naĝbaseno aŭ en la maro, situanta tuj trans la strato.

La dimanĉan inaŭguron ĉeestis reprezentantino de la urbodomo kiu bonvenigis nin. Post la komuna fotado ŝi kun granda intereso aŭskultis diskutojn kaj klarigojn pri Esperanto.

La programo konsistis el diversaj prelegoj, forumo pri Esperanto, transdono de premio Ada Sikorska, vesperaj distraj programeroj kaj unu tuttaga ekskurso. Estis ankaŭ sufiĉe da tempo por promeni kaj ripozi.



Rudolf Fischer regalis nin per rakontado kun interesaj bildoj pri pilgrimado al *Santiago de Compostela* kaj pri spertoj de sia familio kun enmigrintoj, kiujn li kun sia edzino Hedwig prizorgas. Alian tagon li prezentis "Historiajn faktojn malantaŭ la legendoj".

Gian Carlo Figliera rakontis pri Nibelungoj. Hubert De Meyre prezentis vojaĝon kun fervojistoj en Ĉinio kaj donis utilajn informojn por konstrui raportojn laŭ sia skemo. Gesinjoroj Buŝs prezentis la verkistinon Margarita Staraste (1914-2014). Ŝi tre bele ilustris kelkajn librojn. Pri la libroservo zorgis Mariló Torres. Pri tri komencantinoj okupiĝis kaj instruis al ili Esperanton Monique Arnaud.



Rodica Todor gvidis forumon pri la Esperanto-movado kun interesaj temoj : avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la tradicio kaj moderniĝo, kiaj alternativoj por la estonteco. Esperanto de la celo al la rimedo. Valoro kaj utileco de Esperanto. Evoluo de amatore al profesie, konkretaj projektoj. De neprofitcela al pagota agado. Kiel kutime la partoprenantoj laboris en grupoj pri diversaj temoj kaj ĉe la fino unu el ili resumis la enhavon de ilia diskuto.

Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar detale prezentis la Esperanto-centron en *Herzberg am Harz*. Ili parolis pri biblioteko, pri ekstermovadaj ebloj kunlabori por la disvastigo de Esperanto, pri instruado, pri ĝemeliĝo kun la pola urbo *Góra*. Ni eksciis pri iliaj projektoj kaj atingoj rilate al Esperanto. Ili prezentis filmon pri la 10-jara jubileo de "La Esperanto urbo".

La premio de Ada Sikorska estis ĉi-foje destinita ĝuste al Zsófia Kóródy pro ŝia senlaca laboro en la Esperanto-Centro de Herzberg.





Ne mankis du interkonatigaj vesperoj kun ŝaŭmvino kaj manĝaĵetoj, skeĉoj, kantoj kaj vigla babilado. Okazis ankaŭ la kutima vespero kun "cremat" (bruligita rumo kun spicoj). Mankis nur folklorggrupo de "Habaneras". Tamen en la hotelo ĉiuvespere sonis muziko kaj eblis danci. Tre interesa estis spektaklo de flamenko, kiun ni ankaŭ povis ĝui.

La duontaga ekskurso celis promenon en *Cambrils*. Dum la tuttaga

ekskurso ni malkovris tre belan urbon *Morella*. Belaspektas la preĝejo de *Santa Maria*. Tra la konvento ni povis alveni al ruino de la kastelo starigita sur roko. Impresis la muregoj el la 11-a jarcento je 2500 metroj longaj kaj je du metroj larĝaj. Kelkaj post la vizito de muzeo de dinosaŭroj promenis en la stratoj de la pitoreska urbeto kaj ĝuis ripozon ĉe restoracio.

La lastan vesperon ni parolis pri la organizado de la Semajno kaj konstatis, ke ĝi estis



sukcesa kaj bonetosa. Ni ankaŭ diskutis pri la estonteco. Pro la alta aĝo de Luis Serrano la organizado de tiu interesa evento transpenos nova skipo venontjare. Ni ĉiuj dankas al Luis pro lia multjara persista kaj aktiva laboro por Esperanto kaj organizado de tiom popularaj E-Semajnoj. Ni deziras al li trankvilan kaj serenan vivon en bona sano kun lia edzino María.

Liba Gabalda

ESPERANTO KAJ UNIVERSITATAJ AFEROJ



La pasintan 16an de decembro, areto de gepensuloj kunvenis en la Universitato de Sevilo por interparoli pri la rilato inter universitato, liberigo kaj Esperanto. Ni zorgas pri la nuntempa vojo de sklaveco, kiu ĉirkaŭas la uzadon de la angla kvazaŭ ĝi estus internacia lingvo. Ĉi tiu konduto ne estas sola, sed ĝi sumas sian forton al aliaj, kiel la subpremado por produkti artikolojn sekvante la fabrika modelo. La grupo ankaŭ proponis plurajn solvojn.

En la kunveno partoprenis samideanoj, universitataj profesoroj kaj studentoj. Ĉiuj el ili esprimis siajn rezultojn de esplorado kaj siajn ideojn. Unue, Vicente Manzano-Arrodo, profesoro pri esplorado de la konduto en psikologio, prelegis pri la subpremado. La subpremado estas nesimpla afero. Ĝi konsistas en la unuigo de du dinamikoj. Unuflanke, la subpremado kreas fortajn deziratajn celojn. Tiuj celoj ŝajnas verajn bezonaĵojn. Homoj sentas ke oni ne povas bone vivi sen atingi ilin. Aliflanke, la subpremado ankaŭ konstruas altajn murojn, kiuj malhelpas atingi la kreitajn celojn. La sumo de ambaŭ aferoj konstruas misvivon kaj malsanon, krom sklavecaj konsekvencoj. La koncepto permesas kompreni la nunan plimultan uzon de la angla ene kaj ekster la universitato. Oni povas pensi pri Esperanto kiel solvo, kiel liberigilo.

Due, Antonio Rodríguez, ano de la loka asocio de Esperanto kaj e-instruisto, prelegis pri Esperanto. Ĉiuj ĉeestantoj jam konis la internacian lingvon, sed nur kelkaj el ili uzas ĝin. Do, Antonio ne babilis kiel instruisto antaŭ lernantoj, sed kiel pensulo, kiu povas diri multe pri la lingvo. Li rakontis kelkajn anekdotojn, plurajn lingvajn principojn, kaj diversajn ekzemplojn pri la ĉiutaga lingvouzo.

Sekve, Juan Diego Díaz, antropologiisto kaj organizanto de esperantaj eventoj, prelegis pri la kompleksa organizata strukturo ĉirkaŭ la Esperanto en la mondo. Krom pluraj organizaĵoj, Juan Diego centris nian atenton en la eblecoj por nia celo: plibonigi la konadon, la ĉeeston, kaj la uzon de la internacia lingvo en la universitata mondo.

Poste, Guillermo Molleda, profesoro pri ekonomio, prelegis pri la universitata ebleco akcepti la B1 en Esperanto. En Andaluzio, universitataj studentoj devas montri B1-ateston pri iu el diversaj rekonitaj lingvoj. Neniu studento povas obteni sian gradecon sen plenumi tiun kondiĉon. Esperanto ne estas unu el konsideritaj lingvoj. Se ajn andaluzia universitato akceptus esperantan B1, ceteraj devos ankaŭ akcepti ĝin. Guillermo babilis pri la eblecoj kaj malhelpoj.

Kvine, Almudena Rodríguez kaj María Peguero prelegis pri la lernanta sperto de kvar lernantoj. Ĉiu el ili elektis po unu el kvar retmetodoj: Duolingo, la Zagreba Metodo, la

Teorio Nakamura (lernu), kaj Jubilo. Iliaj spertoj estas bonaj, sed ili bezonas iri pli diste ol ĉi tiuj metodoj por plifortigi la lernadon. Ili ankaŭ parolis pri diversaj artikoloj, kiuj raportas rezultojn el esploradoj pri lingva justeco, uzado de la angla kaj uzado de Esperanto.

Fine, José Luis Rodríguez prelegis pri kelkaj intervjuoj, faritaj al universitataj profesoroj kaj studentoj. Per tiuj kaj aliaj intervjuoj, ni celas diskonigi la vivan sperton pri la premado por bone uzi la anglan en universitatoj. El tiuj spertoj, ni celas trovi argumentojn por montri Esperanton kiel solvo.

Dum la lasta horo kaj duono, ĉeestantoj kunpensis pri konkretaj solvoj, inspirataj de la enhavo el prelegoj. La resumita argumentaro estas la sekva. Ni bezonas pensi pri strategio per tri fazoj.

En la unua, ni havas tri demandojn, kiuj bezonas tre precizajn respondojn: (1) kio povus esti “bona universitata konduto” pri la lingva afero? (2) kio okazas nun? (3) kiel Esperanto povas helpi por paŝi ekde 2 al 1? Uzante la tri respondojn, ni povas konstrui bonan argumentadon, kvankam ĝi nur estus teoria argumentado. Tiu respondas al la sola demando “Kial Esperanto estas bona universitata elekto?”

En la dua fazo, ni devas konsideri la emociojn, respondante al la reago “Mi komprenas viajn argumentojn pro uzado de Esperanto, sed mi ne estas heroo”. Por respondi ĝin, ni proponas kvar eblojn: (1) serĉi sukcesajn referencatojn, tio estas, faktojn, spertojn, movadojn, ktp, kiuj uzas Esperanton kiel bona akademiilo aŭ sciencilo, inklusive el famaj universitatoj aŭ famaj esploristoj. Tiuj elementoj montras, ke Esperanto estas eblega ilo por plenumi la akademian bezonojn. (2) Se mi vidas, ke tio estas ebla, mi bezonas ajnan vojon por realigi ĝin; ekzemple: kie mi povas trovi kolegojn, kiuj ne nur estas esperantistoj sed ankaŭ laboras ene de mia fako?. (3) Pretigi novaĵojn, kiuj koincidas samtempe; ĉiuj el ili montras akademian esperantajn okazaĵojn; kaj gravegas ke ĉiuj el ili okazu tre sinsekve. (4) Fari invadon; tio estas, elekti nur unu lokon aŭ unu aferon, kaj koncentri la energion tien. Kiam homoj vidas tion, ke famaj homoj faras X, ke pluraj novaĵoj temas pri X samtempe, ke subite ilia laborejo pleniĝas de esperantaj okazaĵoj... tiam oni pensas ke Esperanto reale ekzistas, kaj ĝi estas bonega elekto. “Kiel mi ne sciis pri tio? Mi devas ekkoni ĝin!”

La tria fazo zorgas pri la “solvaro”. Se oni akceptas la argumentadon pri Esperanto kiel solvo (racia flanko), kaj oni ne havas kondutan rezistadon (emocia flanko), tiam oni bezonas bonan solvon por lerni kaj uzi Esperanton. Ekzemple: kiel mi povas lerni la lingvon kaj obteni kreditilon por alta nivelo kiel B2? Kie mi povas trovi bonan vortaron pri mia fako? Kie mi povas legi kaj publikigi fakan artikolon esperante? Kie mi povas interkontakti kun samfakistoj? Eble, tia fazo estas la plej malfacila el ĉiuj, sed sen ĝi, ni ne povos lasi la nunan situacion. Sed, se ni alvenus tien, ni povos feliĉiĝi, ĉar tio signifos ke la du antaŭajn fazojn estas plenumitaj.

La laboro estas ega. Pro tio, ni estas fervoraj.

las legi la plenan raporton (nur hispane), bonvolu sendi retmesaĝon al vmanzano@us.es.

Vicente Manzano

LA MAJSTRO MORTIS; LA MAJSTROVERKO NE

Jes, la 14-an de aprilo de 1917 (antaŭ 100 jaroj), la koro de L. L. Zamenhof finfine ĉesis bati maltrankvile (aŭ trankvile).

“La Majstro mortis”, tiel ve(e)rkis Julio Baghy en fama poemo. Ĝi legeblas en la reto kun aliaj eroj (“La lastaj tagoj de d-ro Zamenhof”).

Tiu dato povas esti preteksto por priomaĝi la homon kaj la verkon. Tial, alvenis al mi la ideo menciigi kelkajn erojn, kelkajn versojn por instigi al plia legado... kaj agado.

Jen releginda soneto de Geraldo Mattos (publikigita en “Ritmoj de vivo”, Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1968):

OKULISTO

*La tutan tempon, super Esperanto,
kun sinofer' patrina kaj mesia,
li ŝvitis: ĝin li, konstruist' magia,
masonis; liaj ŝultroj de giganto
el vortminejo, en preciza kvanto,
sin servis, ke ĝi staru rektlinia!
Li vivis ĝin; eĉ vivo profesia
sin ŝovis al li, en deviga hanto!
Ĉar, dediĉinte sin al la kuraco
okula, novan lumon li liveris
al blindaj, dum la tuta tag' sen laco;
Kaj nokte, per tradukaj proz' kaj verso,
kaj per originalaj, li konkeris
spiritan lumon por la universo...*



Mi krome reproduktas la tri lastajn versojn de aliaj tri sonetoj de la sama aŭtoro:

EI: ZAMENHOF

[...]
*Sed Morton li frakasas per la gloro,
ĉar pulse batas –ni facile sentas!-
sub ĉiu verda stelo lia koro!*

EL: MAJSTRO

[...]

*Genia mi rapidas vin deklari,
Ĉar sole viaj penoj povis fari
El homoj miksdevenaj unu genton!*

El: HOMARANISMO

[...]

*La veroj estas multaj kaj diversaj;
Ni semu do la kredon unusencan
De amo kaj estimo universaj.*

Kaj fine, jen kurioza omaĝa (akrostika) alfabeto (iam aperinta en "Monato"):

*Al bono celis ĉi doktoro
Esperanto fruktodone,
gloris ĝuste homaran ĥoron -
impresantan jam jargone -
konceptis lingvan mondpostulon.
Ni odas per rimanta strof'
ŝatante tiun unikulon.
Ŭa! Varsovia Zamenhof!*

Jes, homoj mortas sed iel ili vivadas en ties verkoj. Zamenhof mortis sed la majstroverko de D-ro Esperanto vivas kaj vivigas.

Lorenzo Noguero



FUNDACIÓN
ESPERANTO

KRONIKOJ PRI LA TAJFOJ DE BADAJOZ

(Daŭrigo de B.415)

Akiris grandan famon kiel poeto en la kortego de Mutawakkil, Abū Muhammad Abd al-Majjid ibn Abdun, naskiĝinta en Evoro, sekretario de Mutawakkil, kaj aŭtoro de elegio pri la falo de la dinastio Aftasia kaj morto de Mutawakkil, kiam almorabidoj konkeris Badajoz, tre fama en arabaj medioj, sed mi ne ĝin tradukos, ĉar, samopinie kun kelkaj prestiĝaj arabistoj, pensas, ke mankas al tiu poemo minimumaj valoroj lirikaj. Vere ĝi estas frida pedanta retorika rakonto, kiun mi preferas ne reprodukti. Brilas la mallongaj ŝpoemoj de Ibn Abdun, ĉar ili krom lirike bonaj, ne forlasas tiun helon de versoj pripensindaj:

La rigardo de l' destino
lasas spurojn kaj afliktas.
Kial plori pri himeroj
kaj fantomimagoj brilaj?
Mi avertas vin senĉese,
ne dormigu tre trankvila
antaŭ la ungeg' kaj dentoj
de sovaĝleon' tremiga.
Estas tamen la destino
tiu, kiu determinas,
kiel paco devas veni,
kiel la milit' finiĝas,
ne dependas ĝi de l' glavo
nek de militist' senbrida,
ne vin trompu la miraĝo
de supozo erariga.

Dio volu vin pardoni
pro la pensoj plej malicaj,
sed ĉu la destino mastras
la destinon mem rigidan,
se fortune kapricema
la fatalon mem perfidas?
Ni ne povas ja eviti
tiujn vundojn ĉiam tristajn,
kiujn ni persiste faras
per la duboj predestinaj.
Penu haste rememori,
ke la ŝtatoj ĉiam viglas
ne nur per la saĝ' de homoj,
sed precipe se helpitaj
de la scio senegala :
nia Dio, pov' senlima !

Ibn Abdūn forpasis en la jaro 1134.

Unu el la plej distingindaj poetoj de la regno estis Abū Muammad Abd Allāh ibn Sāra, naskiĝinta en Santarem (*), loĝanta multajn jarojn en Seviljo. Li estis, krom bonega poeto, ankaŭ klera reganto de la lingvo kaj gramatiko araba. La aŭtoro de la verko "Dajira" aperigas en la libro, inter aliaj, ĉi tiun poemon:

La oranĝarbo

Tiuj oraj heloj brilaj
palpebrantaj inter branĉoj
per koloroj tiel vivaj,
ĉu ja estas ruĝaj braĝoj
aŭ vangoj ĉarme lindaj
de knabinaj dolĉrigardoj
aperantaj inter ŝtofoj
de lukspalanken-ornamaj?

Ĉu la branĉoj balanciĝas
aŭ tali' de belaj damoj
vibras pro la emocio
kaj suferoj de la amo?

L' oranĝarbon mi ekvidas,
ĝiaj fruktoj kvazaŭ larmoj
montras sin kolorigitaj
per la ruĝ' de amo-flamo,
certe pro l' amarg-suferoj

de amoro sen balzamo.
Fruktoj kun aspekt' glaciaj
kvazaŭ per magiaj manoj,
eltiritaj el la grundo,
kies gust' kaj riĉenhavo,
se faritaj suka vino,
plezurigos la amantojn.

Kiel karneolaj pilkoj
estas tiuj or-oranĝoj,
kiuj sur la branĉoj pendas
kvazaŭ flav-ŝton' el topazo,
dum zefiro ilin batas
kun obstina vigla ardo...
Ni kelkfoje ilin kisas,
alifoje nur per flaro
ni parfumon sorĉan sensas
aŭ l' knabinan vango-ravon!

La brila lirika stilo de ibn Sāra aperas en tiu ĉi poemo verkita ankaŭ de la eminenta poeto:

La zefiro kaj la pluvo

Se vi ĝu-mildiĝon celas
per la brizo de zefiro,
sciu tuj, ke ĝi kunportas
mosk-aromon kaj trankvilon.

Venas ĝi kun riĉa ŝarĝo,
kiun portas mesaĝisto,
konsistanta el parfumoj
de l' amata kaj sopiroj.
Provas la venteg' kostumojn
kaj elektas luksan nigran,

nub-mantelon pretigitan
tie supre kun gracio.
Estas nuboj pluvŝarĝitaj
salutantaj la narcisojn,
kiuj en ĝarden' atendas
bonan pluvon kun avido;
poste, nuboj fine ploras,
dum evitas floroj ridon.
La nubaron grund' instigas
meti al mantelo finon,
kaj la nuboj zorge teksas
per lerteco de la fingroj
fantazian ornamaĵon
per broditaj flor-kapricoj

En la kortego de Badajoz brilis kiel poeto ankaŭ Abū-l-Hasan al-Qurasi al-Uŝbuni Abd al-Rahman ibn Muqāna, naskiĝinta en urbeto nomata Alcabideche, tre proksima al Cintro, kiu jam elstaris kiel tia en la kortegoj de Malago kaj Seviljo verkante multnombrajn poemojn, inter ili unu dediĉitan al la reĝo de Malago, Idris la 2^a. Tiu ĉi reĝo regis dufoje la Malagan teritorion kiam ĝi estis sendependa (1043-1047) kaj (1053-1055). La indikita poemo diras:

Laŭdo al la reĝo Idris

Jam l' unua ektagiĝo
helis por mi lume klara.
Donu al mi vinon, antaŭ
ol la muezin' preĝklama
firme krios kun soleno:
“nur Alaho estas granda!”



Post miksiĝo de vin' kaj akvo
vaste sur la frunt' gutadas
inter liaj tristaj faltoj
kvazaŭ fajnaj perloj blankaj
kaj unue ili ŝvebas,
jen bobel' aerpendanta,
poste turnas kiel ringoj
antaŭ kamelnazo kalma.
Plaĉas drinki dum festenoj
kun junuloj malavaraj,
kiuj montras sin ĝentilaj,
mirtojn ŝerce interŝanĝas ;
plie, ili trinkas vinon,
kiun knabo bel-vizaĝa
verŝas haste laŭ rapido
de gazelo vigle arda...

Rigardadi belan knabon
ĉiam estas ja agrabla,
kiam sur l' ebura frunton
la gagataj haroj falas,
aŭ kiam ekfloras rozo
sur jasmena vango pala.

Lia kranĉ-talio kurbas
kvazaŭ sabl-montet' elstara,
kaj el nokte nigraj haroj
ŝprucas la vizaĝo blanka.
Rozoj el la ektagiĝo
vekis per roseroj ĉarmaj
la narcisojn bonodorajn
per gutado kvazaŭ larma,
dum Plejadoj estingiĝis
en la horizonto rava,
same kiel la jasmeno
en la blanko-hel' forsvagas.

La tenebr-flugilo nokta
fuĝas de l' aŭror' venanta,
kiel nigra korv' forflugas
kaj malkovras l' ovojn blankajn.
Tiam, kiam sun' aperas,
restas ĉiuj blindumataj,
ja la suno estas Idris,
fil' de Ali, fil' de Hammüd,
Princo de kredantoj, fama!

Kiel oni povas konstati, en la poemo montriĝas ekscesa laŭdado, precipe se oni rimarkas, ke temas pri regolo (reĝeto) ne elstara inter la ceteraj de la al-andalusaj regnoj, ja la tajfo de Malago estis sufiĉe malgranda, sed ni tuj diru, ke tiuj pompaj laŭdaj versoj intencas nur imiti la protokolon de la tiama kortego de Bagdado, dum la periodo de la al-andalusaj tajfo-regno sufiĉe influa. Ibn Muqāna sentis grandan nostalgion pri la vivo kamparana, kaj kiam maljuniĝis revenis al sia naskiĝ-loko, kie laboris kiel simpla kamparano ĝis lia vivofino.

Alia elstara poeto de sama kortego estis Abū Abd Allah ibn al-Bayn, de Badajoz. Pri tiu ĉi poeto rakontas al-Bassam, aŭtoro de la verko “Kitab al Dajira”, ke en certa okazo konversaciis al-Bayn kaj Ibn Sāra, kiam tiu ĉi lasta poeto improvizis poemon kaj diris al la alia: Bonvolu kompletigi jenajn versojn, kaj li recitis:

Kiel junulin adolta
estas tiu ĉi bedaro,
kies belaj vestoj montras
jen tunikon, jen floraron:
verd-vestiĝas la printempo,
floroj estas juvelaĵoj...

Ibn Bayn daurigis:
Kaj langvora pro suferoj
brizo estas la amanto,
kaj la fulmo ĝia koro,
kiam plendas ĝi pro amo.
Pluvo estas ĝia ploro,
kiam ĝi elverŝas larmojn,
se l' amanto ne kompleksas
la aspirojn de la damo.
Kaj la floroj ĝoje ridas

Laŭ Maqqari II.pĝ. 418, tiu sama sceno okazis inter Ibn Sāra kaj Abū Bakr al-Qabturnu. Sed ĉiukaze la sceno estas fidele reproduktita.

Nepre ni devas mencii ne nur kiel poeton sed kiel antologiiston kaj historiiston la eminentan Abū-l-Hasan Ali ibn Bassām, naskiĝinta en Santarem, kvankanloĝanta en Lisbono kaj plej ofte en Seviljo. Jen fragmento de unu el liaj poemoj:

Nu, ekhastu kaj ekzorgu!
En la viv' nenio gravas
pli ol vinpokal' bongusta
aŭ la belulin' amata!
Estu ne maldiligenta
pri la celoj viaj altaj,
ofte vinon kaj ĝardenon
grize la nebul' vualas
kaj necesas nur decido
por malkovri belon ravan.
Iru vi do senhezite
al ĝarden' de vi revata
eble vian celataĵon
nure simpla gazo kaŝas
kaj atendas vian iron
por oferi sin plenplaĉa!

Ibn Bassām esprimis en sia "al-Dajira" kiom li amis la poezion, montris la altan nivelon de sia talento pri beletro, same pri la orienta kiel pri la okcidenta, kvankam neniam li kaŝis sian simpatian kaj preferon por siaj al-andalusaj samlandanoj.

Abū-l-Hasan Ali ibn Bassām forpasis la jaro 1147.

(Santarem: urbo sub rivero Taĵo, kiu situas en la regiono de la antikva portugala provinco Ribatejo.

El mia verko Lirikaj Perloj de Al-Ándalus

Antonio Marco Botella

PRELEGO DE MATI MONTERO ELHISPANIGITA DE MIGUEL FERNÁNDEZ

Partopreno en la ronda tablo, per kiu oni inaŭguris la teatran ciklon “Paper-virinoj aŭ Virin-roloj: monologoj far inaj fikci-personoj”, kunordigitan de Nuevo Teatro Fronterizo [Nova Teatro ĉe la Limo], kompanio de José Sanchis Sinisterra.



“Janis Joplin kaj Marjane Satrapi, verkistinoj pri margena literaturo aŭ sublitteraturoj: figuroj esencaj en la historio de la muziko kaj la komikso faritaj de virinoj”, aŭtorita de Mati Montero

(Unua parto)

Unue, mi volas danki la organizantojn de ĉi ronda tablo pro tio, ke ili invitis min partopreni en ĝi pri la temo virinoj, kiuj eventuale servis kiel modelo al aliaj virinoj en batalado kontraŭ la sociajn konvenciojn. Estas por mi granda honoro la fakto, ke, estante invitita, mi povas alporti mian vidpunkton de sur mia agadkampo, Filologio kaj Edukado, ĉe la enkonduko de ĉi ciklo de teatraj monologoj pri insecsaj fikci-personoj nomata “Virin-roloj”.

Ankaŭ la publikon mi dankas pro ĝia ĉeesto kaj pro ĝia intereso al la temaro de ĉi kunvenoj surbaze de aktoraj legoj. Aparte mi dankas José Luis, Sandra, Alejandra kaj Miguel pro ilia fido pri mia literatura kompetenteco, pro kio jen mi sidas nun ĉe vi ĉiuj.

“Paper-virinoj” konstituas por mi la ŝancon alporti mian puzlo-pecon al ĉi ciklo de insecsaj personoj, aŭtoroj kaj verkistoj, kiuj, frontante siajn epokojn, estas duoble agnoskataj de ni. Ili ja trabatis vojon al multaj virinoj, kiuj povis konatiĝi kun la spuroj postlasitaj de tiuj modeloj tiel malmulte konvenciaj

Direndas, ke mi alprenis la decidon elekti tre specifan temon: tion, kion en Literaturo ni nomas “paraliteraturoj”, “subliteraturoj” aŭ “marĝenaj literaturoj”. Nome tion, kio ne ŝajnas literaturo, sed tamen estas literaturo, kiel, ekzemple, la muziko, pere de la kantotekstoj, kaj la komikso, pere de la vinjetoj.

Al mi ŝajnas rimarkinda aŭ nemalhavebla potencigi en ĉi ciklo kaj preparoli tiujn virinojn, kiuj, surbaze de eksterordinareco kaj rimed-malabundo, dediĉis sin al io ortodokse ne rigardata literaturo, sed kio verŝajne, ĝuste pro tio, ke ĝi ja estas literaturo, markis niajn vivojn. Temas, ekzemple, pri la kantistinoj, kiuj verkas, komponas kaj/aŭ adaptas siajn proprajn kantojn, kaj pri la desegnistinoj, skriptistinoj kaj kreantinoj de komiksoj. Ambaŭ mondoj estas tre markitaj de la vira ĉeesto. Se mi demandas pri tio, kiom da komiks-desegnantinoj konatas, eble neniu nomo venas en la memoron. Kaj tio, paradokse, kuriozas, ĉar oni supozas, ke la virinoj troviĝas en situacio de egaleco kaj trairis saman vojon kiel la viroj. Male, la demando menciitaj nomojn de kantistinoj, poetkantistinoj kaj komponistinoj povas esti pli facile respondebla. Tion spite, ankaŭ tiuj virinoj devas aŭ devis fronti mondon kompleksan kaj viran, kie la fizika belo kaj la konduto fariĝas vizitkarto kaj eble triumfokarto prefere al iliaj propraj artaj kvalitoj, iliaj voĉo, energio, aŭtenteco. Ĝuste tial mi pritraktos du figurojn, kiuj al mi ŝajnas ikonaj sur tiuj kampoj: Janis Joplin kaj Marjane Satrapi.

Janis Joplin estis teksasa junulino, kiu, meze de la 20a jarcento, frontis sian epokon, mondon malakordan kun ŝi, kaj triumfis per la grandiozo de sia voĉo kaj de siaj rektaj ludadoj. La faktojn, kia estis lia vivo kaj kia ŝi konceptis la muzikon, bone portretas jenaj vortoj de ŝi diritaj kadre de unu el ŝiaj koncertoj: “Se vi atingas, ke oni stariĝu, kiam oni devus sidi, ke oni ŝvitu kaj agitiĝu, kiam oni devus teni sin al konvenciaj manieroj, ke oni ridetu, kiam oni devus aplaŭdi tute kiel decas... Mi imagas, ke se vi atingas kapti certajn homojn, al kiuj de ĉiam oni diris, kion ili, homoj tro junaj aŭ tro timemaj al io ajn, devas fari, mi kredas, ke iel vi ekfunkciigas ilian cerbon kaj igas ilin pensi, ke eble ili povas ion fari. La rokenrolo estas por tio, por uzi la ŝaltilon kaj igi ilin vidi, ke estas aliaj ebloj kaj ke stultas ne provi ilin. Povas esti, ke vi ne atingas feliĉi, sed kiel granda fotriĝo estas tion ne provi. Tio egalas suicidi tuj post ol esti naskita”.

Janis Joplin vivis kontraŭflue. Diferencis de tio, kion oni atendis de virino en ŝia aĝo en la 60aj jaroj. Ŝi estis rifuzata, disdegnata de siaj klaskunuloj kaj insultata en sia urba gimnazio, en kies revuo aperis publikigita foto de ŝi kun jena indiko “jen la plej malbela knabo el la jaro”. Ĉi faro ripetigis du sinsekvajn jarojn kaj jam de tiam, dum sia tuta vivo, ŝi kulturentis la sekvan komplekson, solecon kaj la personan tragedion esti marĝenigata, ne akceptata, esti en malakordo kun ĉio. Kaj ĉio ĉi poste videbliĝos en ŝia muziko.

“skripto: (vorto ne en PIV) estas antaŭteksto de kultura produkto: filmo, prelego, intervjuo, romano (ekzemple tajposkripto) ktp. Se por filmo, oni jen kaj jen uzis la francismon "scenaro" (jes en PIV); tamen la skripto de filmo enhavas ne nur priskribojn de la scenoj, sed ankaŭ la parolojn de la aktoroj kaj multajn aliajn detalojn, eĉ desegnojn. Verkiston de skriptoj oni nomas skriptisto”. (El Vikipedio).

Janis Joplin estis teksasa junulino, kiu, meze de la 20a jarcento, frontis sian epokon, mondon malakordan kun ŝi, kaj triumfis per la grandiozo de sia voĉo kaj de siaj rektaj ludadoj. La faktojn, kia estis lia vivo kaj kia ŝi konceptis la muzikon, bone portretas jenaj vortoj de ŝi diritaj kadre de unu el ŝiaj koncertoj: “Se vi atingas, ke oni stariĝu, kiam oni devus sidi, ke oni ŝvitu kaj agitiĝu, kiam oni devus teni sin al konvenciaj manieroj, ke oni ridetu, kiam oni devus aplaŭdi tute kiel decas... Mi imagas, ke se vi atingas kapti certajn homojn, al kiuj de ĉiam oni diris, kion ili, homoj tro junaj aŭ tro timemaj al io ajn, devas fari, mi kredas, ke iel vi ekfunkciigas ilian cerbon kaj igas ilin pensi, ke eble ili povas ion fari. La rokenrolo estas por tio, por uzi la ŝaltilon kaj igi ilin vidi, ke estas aliaj ebloj kaj ke stultas ne provi ilin. Povas esti, ke vi ne atingas feliĉi, sed kiel granda fotriĝo estas tion ne provi. Tio egalas suicidi tuj post ol esti naskita”.

Janis Joplin vivis kontraŭflue. Diferencis de tio, kion oni atendis de virino en ŝia aĝo en la 60aj jaroj. Ŝi estis rifuzata, disdegnata de siaj klaskunuloj kaj insultata en sia urba gimnazio, en kies revuo aperis publikigita foto de ŝi kun jena indiko “jen la plej malbela knabo el la jaro”. Ĉi faro ripetiĝis du sinsekvajn jarojn kaj jam de tiam, dum sia tuta vivo, ŝi kuntrenis la sekvan komplekson, solecon kaj la personan tragedion esti margenigata, ne akceptata, esti en malakordo kun ĉio. Kaj ĉio ĉi poste videbliĝos en ŝia muziko.

Janis havis negrinan voĉon, kvankam ŝi ne negris, kaj la muziko fariĝis ŝia rifuĝo. Kiel kantistino ŝi tiel bonis, ke ŝia postmorta disko, *Pearl* [Perlo], tenis sin dek kvar sinsekvajn semajnojn en la numero 1 de la furorlistoj kaj vendiĝis pomilione. Sed, neeviteble, Janis mortis kelkajn tagojn antaŭe, unu nokton en 1970, pro drog-superdozo, sola en sia ĉambro, spertinte studian seancon en preparo de tiu disko. Tiuepoke ŝi, supozeble, jam estis forlasinta la drogojn. Aŭ ŝi forlasis ilin por iom da tempo. Unu el la kantoj de ŝia disko, *Me and Bobby Mc Gee* [Mi kaj Bobby Mc Gee], komponita de ŝia tiama amanto, Kris Kristoferson, fariĝis, dank’ al ŝia voĉo, la numero 1 dum unu tuta semajno en la furorlisto de plej sukcesaj kantoj en la radio. Nelonge antaŭ sia morto, Janis revenis en sian iaman gimnazion. Eksaj gelernantoj tie faradis memor-feston kaj en ĝi ŝi vidis siajn alitempajn mediokrajn gekunulojn kaj plezuriĝis, ĉar ŝi estis triumfa. Kutime ŝi vestis sin per siaj hipiaj tunikoj, siaj plumoj kaj sia eterna ironia rideto. Ŝi estis jam disŝirinta la koron de multaj per sia voĉo kaj la tekstoj de siaj kantoj, per la melankolio kaj la nostalgio, kiuj plenigis ŝiajn kantojn. Eble ankaŭ per despero. Ŝi sciis, ke ŝiaj diskoj akiros la kategorion or-diskoj en rekorda tempo. Sed ŝia soleco, ŝia neelĉerpebla serĉado kaj ŝia dependeco de alkoholo kaj heroino akompanis ŝin ĉiam, malgraŭ la sukceso, kiun ŝi kolektis, kaj ŝi estis konscia pri tio. Ofte ŝi komentis, ke post ĉiu koncerto, ŝi trovas sin ĉirkaŭita de homoj kaj en la sekva minuto, sola en sia ĉambro.

(*Daŭrigota*)

fotri: sinonimo de “fiki”, uzata ankaŭ en la senco “tedaĉi”, “ĝenaĉi”.

mediokra: mezaĉa, malbrila. (Reta Vortaro).

DETALE PROGRAMO (PROVIZORA) DE LA 76 HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

ANTAŬKONGRESAJ AKTIVADOJ

Lundo 19 – merkredo 21, en Teruelo: aktivadoj de disvastigo de Esperanto por la loka loĝantaro.

Merkredo 21 en Madrido: prezento de la kongreso en la “Casa de Aragón” de Madrido.

Ĵaŭdo 22 en Teruelo:

Matene: turisma promenado (neformala)

Vespere: renkonto de E-lernantoj, kaj intensiva kurso; inaŭguro de ekspozicio, prezentado al ekstera publiko, instalado de Libroservo.

VENDREDO 23 DE JUNIO

Mateno

12 – 14 Turisma vizito al centra monumento

Vespere

17 - 18: Prelego pri Esperanto en Aragono kaj Teruelo

18 - 20 Oficiala malfermo

21 - 22 Komuna manĝado

Nokto

22 - 24 Muzika koncerto de Martin Wiese en Fonda del Tozal

24 Astronomia aktivado organizita de ACTUEL en San Blas

SABATO 24 DE JUNIO

Mateno

De la 9: KER-ekzameno

10 a 11 Ĝenerala kunveno de HEF

11 - 12 Prezento de la Jaro Zamenhof

12 - 13 Konferenco pri Francisco Azorín

13 - 14 Inaŭguro Placo Esperanto

Vespere

16 – 17 Vizito al Mausoleo de la Geamantoj

17 – 18 Prezento de novaj libroj

18 – 20,30 Prelegoj

Nokto

23 - Muzika koncerto de Kajto Kvarope en Fonda del Tozal

DIMANĈO 25 DE JUNIO

Mateno

10 – 12 prelegoj

12 – 14 Turisma vizito al Albarracín. Bankedo kaj formala fermo de la kongreso

Vespere

Prelego kaj vizito al la restaĵoj de la interna milito

POSTKONGRESAJ AKTIVADOJ

Lundo 26 – mardo 27

Seminario de TEJO por junuloj

Matenoj: Seminario por aktivuloj

Lundo vespere: turisma vizito kaj neformalaj babiladoj

Pliaj informoj: <http://www.esperanto.es/kongreso>

